brilanta klakĉapelo<sup>2</sup> kaŭzis homamasigojn en la kvartalo kaj ne restis neremarkitaj. Cetere: je tiu epoko mia Patro jam publikigintis siajn unuajn librojn pri bicikloj. Resume: la liceestro plurfoje direktis al li rimarkojn pri liaj maloportunaj elmontradoj. Sensukcese!

Tiam li estis kunvokita al la Ministerio Pri Publika Instruado, kie la Ministro alparolis lin proksimume jene:

"Mia kara Profesoro, onidiroj atingis miajn orelojn, je kiuj mi neniel kredas, bonvolu min kredi, kiuj ŝajnus pruvi ke vi praktikas - ni diru - sportajn okupojn, kiuj ne indas en ofico de Profesoro kandidato al École Polytechnique. Ne necesas, ke mi diru al vi, ke mi certas, ke ĉio tio estas nura publika klaĉado kaj ke nenio tia veras), sed, vidu, necesas malfidi je tia klaĉado. Mi trastudis vian dosieron, vi junas kaj - kredis min - vi havas belan estontecon antaŭ vi; vi ne devus stulte ĉion fuŝi. Tiam, vidu, kara amiko, lasu do tiujn cirkajn ludojn al la profesiuloj de l'areno (tiel)".

La studentoj de la elita Polytechnique kaj kandidatoj al X<sup>3</sup> kantis en tiu epoko kanzonon inter tiom da aliaj kanzonoj, kies strofoj finiĝis ĉiuj pere de "On dirait du veau" (Ŝajnas, ke s'tas bovidaĵo<sup>4</sup>). Estis moda frazo je tiu momento same kiel pli malfrue oni kantis: "Merci pour la langouste". (Dankon pro la langusto) Ĉiu strofo de tiu kanzono koncernis specifan Profesoron. Ĝi estis kantata laŭ la melodio moda de kanzono titolita "Je cherche fortune autour du chat noir"<sup>5</sup> (Mi serĉas bonŝancon ĉirkaŭ la nigra kato") La strofo koncernanta mian Patron estis la sekva:

*Sur sia biciklo*

*La dia Carlo*

*Triste mienas*

*Ŝajnas ke s'tas bovidaĵo.*

Kiom da fojoj mi aŭdis ĝin kanti dum student-procesioj sur la bulvardo Saint-Michel. Kompreneble tia reklamo ne glatigis la aferon.

Ŝajnas al mi, ke tiuj okazaĵoj iel kaŭzis lian forlason de la Liceo Saint-Louis, kvankam mi tion ne povas aserti. Plurajn monatojn poste li sin prezenti en la Conservatoire des Arts et Métiers<sup>6</sup>, kie li tuj estis elektita dank'al plimulto kontraŭ d'Ocagne<sup>7</sup>.

Mi havus ankaŭ aliajn rakontendaĵojn, mi faros tion pli poste.

Fartu bone! Jean

<sup>1</sup> La lavallière, aŭ "ascot" estas kravato laŭ stilo de bant-kravato portata de viroj kaj virinoj, kies uzo malmodiĝis.

<sup>2</sup> Klakĉapelo en tiel brila nigra silko, ke eblis nombri ok rebrilojn.

<sup>3</sup> "X" estas alia kutima nomo de la elita École Polytechnique.

<sup>4</sup> "Ŝajnas, ke s'tas bovidaĵo" eltiraĵo de opereto de Jacques OFFENBACH.

<sup>5</sup> Le Chat Noir: tiama fama Pariza kabarredo.

<sup>6</sup> Inĝeniera altlernejo.

<sup>7</sup> D'Ocagne estas la nomo de lia kons-tanta rivalo.



# La 65-a IFEF-KONGRESO en ARTIGUES ĉe BORDOZO

Temo de la kongreso: Rolo de la fervojoj en la disvolviĝo de la moderna mondo.

Ĝi okazis en la sudokcidenta parto de Francio de la 4-a ĝis la 11-a de majo 2013 en *Artigues près Bordeaux* (Artigues ĉe Bordoza) Samtempe kongresis UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto). Esperanto harmonie kunigis la du asociojn. La aranĝojn partoprenis pli ol 250 geesperantistoj el 17 landoj. Al la kunorganizado multe helpis la ĝirondia Esperanto-grupo, kies prezidanto estas Bernard Sarlandie. Pri altkvalitaj kulturaj programeroj en kiuj rolis ĉiuj grupanoj zorgis precipe Marcelo Redoulez kun Claudine Pomirol. Jam la nekutima interkona vespero donis imagon pri io eksterordinara. Kaj tiel efektive estis dum ĉiuj vesperaj kulturaj programeroj. Multaj surprizoj atendis nin. Al interkoniĝo kontribuis per akordiona muzikado kaj Esperanto-kantoj la konata franca esperantisto FAMO.

En la dimanĉa solena inaŭguro honorigis nin la vicprezidanto de la ĝenerala konsilio Jean-Marie Darmian. La bonvenigon de la ĉeestantoj komencis la prezidantino de LKK (Loka Kongresa Komitato) Sylviane Lafargue. Salutis Rodica Todor - la prezidantino de IFEF, Claude Nourmont - la vicprezidantino de UEA, Bernard Sarlandie - la prezidanto de ĝirondia E-grupo, Stefan Mac Gill nome de ILEI.



Sekvis kantado de Esperanto-himno kun akordiona akompano de FAMO. Post la paŭzo komenciĝis salutado de ĉiuj reprezentantoj de ĉeestantaj landaj asocioj, kaj oni legis ret-alvenintajn bondezirojn de gravaj organizaĵoj kaj unuopuloj. Inter kiuj ankaŭ tiu de Probal Dasgupta la prezidanto de UEA. Antaŭ la fino Rodica Todor honorigis kaj transdonis diplomojn al Jeannine Daguin, Bernard Sarlandie kaj Marcelo Redoulez pro ilia meritplena laboro por Esperanto. Post la tradicia komuna fotado ĉiuj estis invititaj al aperitivo okazanta antaŭ la restoracio. Sunbrilo aperis sur ĉiuj vizaĝoj.

Dum la semajno okazis fakaj prelegoj, komitat -kunsidoj, diversaj labor-kunvenoj, oni pri-traktis movadajn aferojn, prezentis novaĵojn el fervoja mondo. Kundiskutis terminara komisiono, okazis ILEI sesio pri la projekto de E-kurso ne nur por fervojistoj. Tre allogaj estis la prezentoj de la venontaj IFEF-kongreso en Italio kaj tiu de UEA en 2015 en Lillo. Oni spektis filmon pri Esperanto kaj mallongan humuran desegno-filmeton "La barriergvardistino". Daniel Moirand tre lerte rakontis pri "Mil kaj unu noktoj". Stefan Mac Gill prelegis pri "Rolo de la fervojo en moderna mondo", Michel Lafosse tre kompetente kaj detale prelegis pri "Bordoza tramo". Lia prelego kompletigis antaŭan viziton de kelkaj interesuloj al la tram-prizorgejo. Ili konstatis grandan similecon kun trajn-riparejo. Robert Combes kun sia edzino prezentis bildojn pri la konstruado de la "Viadukto des Fades", nuntempe jam ne funkcia. Mireille Grosjean parolis pri "Japanaj trajnoj", Andrej Grigorjev el Kranojarsk pri "Siberia fervojista sindikato", Pjer Buvje pri la "Unua libro kaj la Bona Lingvo", Marcelo Redoulez pri "Bordoza Maskeronoj". Bone funkciis libroservo, okazis ekumena Diservo.



La prezidanto de la ĝirondia Esperanto-klubo Bernard Sarlandie kontaktis ĵurnalistojn kaj oni aperigis artikolojn pri Esperanto. Aperis tri numeroj de kongresa bulteno. Estis reelektita la ĝisnuna estraro por trijara periodo. Ankaŭ UFE elektis kaj prezentis novan estraron kaj pridiskutis siajn movadajn aferojn.

Al agrabla posttagmezo-fino kontribuis la muzikgrupo "Maragane" instruante gaskonajn dancojn. Alian tagon same entuziasme instruis kantadon Ankie kaj Nanne - la duopo el Kajto. Ambaŭ grupoj prezentis vesperan koncerton. Ili plezurigis la ĉeestantojn - pri tio atestis longaj varmaj aplaŭdoj. En aliaj vesperoj temis pri lirikaĵoj de Morine Stride kaj plaĉaj kantoj kun pianakompano de Isabelle. Tre amuzan spektaklon "La sekreto de la magia trajneto" prezentis kanta kaj teatra trupo "La Kompanoj" de Esperanto-Ĝirondio. Ĝi estis speciale kreita por la fervojista kongreso. Bankedo plensatigis ĉiujn kiuj partoprenis ĝin. Tripersona fer-voja orkestro dancigis kelkajn ĉeestantojn. Al la internacia vespero kontribuis la ĉeestantoj per kantoj, poemoj, mallongaj rakontoj kaj muzikado.

Okazis pluraj duontagaj ekskursoj dum kiuj ni vizitis (per piede aŭ el panorama buso) la belan urbon Bordoza. Alia interesa vizito gvidis nin al la rava mezepoka urbeto *Saint Emilion* (Sankta Emiliono) situanta en la koro de la bordoza vitejo. Ĝi estas konata ĉefe pro bona ruĝa vino, kiun ni ĉe la fino de la vizito gustumis. Alia tiea specialaĵo por frandemuloj estas makaronoj. Nu, la urbeto riĉas je historio. La plej interesa malkovro por ni estis vizito de la plej vasta monolita preĝejo en Eŭropo. Aliaj ekskursantoj partoprenis viziton al la Citadelo de Blajo.



## Fajfu, jen la vivo !



Tie ni surgrimpis la dunon Pilat por spekti vastan ĉirkaŭaĵon -

unuflanke arbaron, - aliflanke maron. La sablo estas tre fajna. Ŝippromenado tra la arkaŝona golfeto ebligis vidi la dunon de alia flanko. Ĝi etendiĝas je distanco de 2,7 kilometroj kaj altas pli ol 100 m super la marnivelo. Bonege ni tagmanĝis en loka restoracio.

Alia tuttaga ekskurso vizitigis al partoprenantoj la subĉielan landezian vilaĝon Markvezo. Ambaŭ ekskursoj estis riĉ-enhavaj kaj ĉiuj partoprenantoj estis tre kontentaj.

Post la solena fermo kaj transdono de la kongresa flago la fama koruso "Interkant" prezentis tre interesan spektaklon pri la opero Karmen sub la gvido de Franjo Lévêque.

La postkongresa ekskurso kondukis nin al *Pauillac* (Poĵako), kie ni iom aventureme enŝipiĝis por atingi la insuleton *Patiras* (Patiraso). Tie ni ekologie tagmanĝis laŭ ne kutima maniero - sen manĝilaro. (Tiamaniere estas ŝparata 40 litroj da akvo por persono). Ĉio bongustis. Al bonhumoro kontribuis Kajto.

Konklude: ambaŭ kongresoj estis tre sukcesaj kaj oni havis okazon ekkoni novajn samideanojn. Alia pozitiva afero estas, ke kelkaj esperantistoj membriĝis ĉe IFEF kaj estis akceptita nova landa fervojista asocio

en Kubo. Pro tre alloga prezento fare de italoj kelkaj entuziasmoj (ne fervojistoj) jam aliĝis al la venonta IFEF-kongreso okazonta en la itala urbeto *San Benedetto del Tronto* situanta 300 km sude de *Bologna*. Aliĝu ankaŭ vi, ĉar la italoj garantias belan sunan veteron kaj buntan programon!

Ni ĝuis tre agrablan semajnon enhavantan riĉan programon, interesajn kulturajn programerojn sukcesplene preparitajn de lokaj geesperantistoj. Grandan dankon al ili.



# EKSPOZICIO-MATERIALO DE ESPERANTO-FRANCE-EST

## ESPERANTO-FRANCE-EST disponas nun pri 2 ekspozicioj.

Ĉe nia prezidanto estas pruntepreneblaj 12 paneloj de ESPERANTO-FRANCE.

Ili estas alkröĉeblaj aŭ stari-geblaj sur kelkaj tabloj.

Konsilo rilate la instaladon de ekspozicio : la prizorganto de la ekspozicio loku sian informtablon sufiĉe for de la panelaro, por ke la vizitantoj povu trankvile ilin trastudi.



**E**  
**S**  
**P**  
**E**  
**R**  
**A**  
**N**  
**T**  
**O**

**C'est... une langue**

**internationale**  
Pour des échanges entre tous les citoyens du monde

**neutre et équitable**  
Indépendante de toute nation, elle permet de communiquer sur un pied d'égalité.

**simple mais riche**  
Prononciation claire  
Grammaire facile  
Conjugaison logique  
Langue agglutinante.

**avec une culture**  
Dans tous les domaines : littéraire, scientifique, musical, cinématographique...

**éducative**  
Précise et nuancée. Facilite l'apprentissage d'autres langues.

**jeune et vivante**  
Lancé en 1887, l'espéranto évolue comme les autres langues.

**utilisée sur internet**  
Internet supprime les distances physiques, l'espéranto supprime les barrières des langues.

**Le monde au bout de la langue**

**E**  
**S**  
**P**  
**E**  
**R**  
**A**  
**N**  
**T**  
**O**

**Utilisée sur Internet**

**Discuter avec des amis aux quatre coins du monde**

**Correspondre**

Listes de diffusions  
amigos\_yellos\_group@groups  
Listes de discussions  
pu@lang.net/ostendo, babilarjo.org/

**Recherche de correspondants**  
esperantomundo.net, Estelado.net, membres.multimania.fr/lanormel, my.languagexchange.com.

**Partager**

Des réseaux sociaux ipernity, Facebook, Twitter ont des interfaces disponibles en espéranto.

**Lire**

Des livres à télécharger sur [ocw.willabooks.org](http://ocw.willabooks.org)  
Des ouvrages scientifiques de la Virtuala biblioteko de AEK [esperanto.org/AEK/](http://esperanto.org/AEK/)  
Des œuvres de la Bibliothèque espérantophone sur un portail [esperanto.net/web/](http://esperanto.net/web/)  
Des poèmes, nouvelles, romans, essais, pièces de théâtre sur [bestiweb.net/esperanto](http://bestiweb.net/esperanto)  
Des livres électroniques librement téléchargeables sur le site de Matthew McClintock [mtybooks.net](http://mtybooks.net)  
Des traductions en espéranto d'œuvres russes sur [esperanto.mv.ru](http://esperanto.mv.ru)

**Voir**

Des vidéos en espéranto sur [esperanto.net](http://esperanto.net)  
Des films en espéranto sur [esperanto.net/films/](http://esperanto.net/films/)  
Une page consacrée au cinéma et à l'espéranto sur [Sindona.be](http://Sindona.be)

**Ecouter de la musique**

Des musiques de tous les continents sur [pu@lang.net/musica](http://pu@lang.net/musica), [veitissimo.com](http://veitissimo.com), [Arctica.bea.net/](http://Arctica.bea.net/).

**Ecouter des radios** **FACIL VERA**

Radio Verda - Émissions de radios et Archives en espéranto de Vancouver  
Radio Arkivo - Archives des émissions de radios en espéranto dans le monde.  
Radio Kubo - Radio Cuba en Esperanto  
Pola Radio Varsovio - Pologne  
Radio Esperanto-Kullagraj, Brest  
Radio Bazo-Radio communautaire Australie  
Parolu Mondo - Brésil  
Radio China Intermacia - Chine

**Jouer**

Jeux de lettres, de stratégie, de cartes, d'énigmes...  
à télécharger ou pour jouer en ligne.

**Apprendre gratuitement l'Espéranto**

Cours, grammaire, dictionnaires en ligne  
[ternu.net/](http://ternu.net/) [kurso.esperanto-jeunes.org/](http://kurso.esperanto-jeunes.org/)

**Le monde au bout de la langue**

En la grupo de Nancy Gisèle BERTAPELLE kreis serion da 9 afiŝoj je formato A2 (4 x A4). Ili estas pruntepreneblaj, bonvolu kontakti la grupon de NANCY

### En nia retejo:

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>  
eblas vidi la foton de la 9 afiŝojn

## Historio de ESPERANTO-FRANCE-EST

Nia asocio *Esperanto France Est* havas ankaŭ specifan retejon pri ĝia historio. Ĝi estas anti-gebla tra la menuo de <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

aŭ per <http://esperanto.france.est.free.fr/historio.htm>

Dank'al la laboro de Ginette Martin kaj Catherine Roux, pliaj jaroj estas atingeblaj, la jaro 2000 kaj baldaŭ ankaŭ 2001 estas enretigitaj.

Por atingi la diversajn jarojn mi kreis plurajn malvolveblajn menuo-fenestrojn. Tio tre bone funkcias, kiam oni uzas *Internet Explorer*. Sed per aliaj navigiloj ekestis problemoj. Ekzemple per *Mozilla* la malvolveblaj menuo-fenestroj restas malaktivaj. Mi ne sukcesis trovi la taŭgan kodon por tion solvi. Tial mi decidis krei novan paĝojn, kie eblas alklaki ĉiujn jarojn de

1950 1 2 3 4 5 6 7 8 9 1960 1 2 3 4 5 6 7 8 9 1970 1 2 3 4 5 6 7 8 9 1980 1 2 3 4 5 6 7 8 9

1990 1 2 3 4 5 6 7 8 9 2000 1 2 3 4 5 6 7 8 9 2010 1 2 3 4 5 6 7 8 9 2020 1 2 3 4 5 6 7 8 9

1950 ĝis 2000 kaj eĉ pli.

Se vi ne sukcesas atingi tiun paĝon, tiam premu la klavon F5 (eĉ plurfoje) por aktualigi la paĝojn.



## La 4-a PRINTEMPE en DAHLEM-BAASEM 30.3. - 6.4. 2013

La Paska semajno organizita de EsperantoLand sub la gvido de Lu Wunsch-Rolshoven okazis fine de marto kaj komence de aprilo en *Dahlem-Baasen* meze de la *Eifel* regiono en Germanio. Partoprenis ĝin malgranda grupo de 12 geesperantistoj el Belgio, Francio kaj Germanio. Ni povis pli bone konatiĝi kaj ĝui agrablajn tagojn en la neĝkovrita pejzaĝo. La feria domo troviĝas en iom izolita loko duonĉirkaŭata per arbaro. Ĝi posedas ĉion por bona komforto de la uzantoj, eĉ naĝejon. Ĉiutagaj manĝoj estis abundaj kaj bongustaj. Por festi Paskon, ne mankis ĉokoladaj kaj koloraj ovoj kaj ankaŭ bongusta ŝafidforma kuko. De la manĝejo videblis la vilaĝo *Baasem*.



Ni aŭskultis prelegojn kaj ĝuis bildprezentadojn pri vojaĝoj prezentitaj de la partoprenantoj. Marcel Delforge rakontis pri sia vojaĝo per Transsiberia trajno survoje al Azia kongreso en Mongolio kaj pri interesa ŝipado kaj navigado tra la Danuba Deltio en Rumanio. Oni spektis tri filmetojn, kiuj gajnis konkurson rilate al Esperanto. Tre interesa estis filmo pri Sumatro de Jean François Cousineau dum lia vojaĝo tra tiu ekzotika lando. Liba kaj Floreal Gabalda prezentis filmojn pri Venezuelo kaj ties folkloro vilaĝfesto.

Ni piedpromenis en la proksima ĉirkaŭaĵo, vizitis la urbeton *Kronenburg* kaj promenis laŭlonge de ĝia lago. En *Bad Münstereifel* ni admiris historian centron kaj plu-ekzistantajn fortikaĵojn. Ĝi apartenas al la plej bone konservitaj mezepokaj urboj en *Rheinlando*. Ravis nin



la pito-



reska urbo *Monchau*, situanta en rokeca valo de la okcidenta parto de la *Eifel* regiono en proksimeco de la belga limo. Marcel vespere rakontis pri aventuroj de Michel Schmitz kaj la gastejo *Baraque Michel*, kiu rilatas al tiu regiono. En la urbeto *Nettersheim* ni vizitis naturcentron kaj ties ekspozicion pri la naturo kaj historio de la regiono kaj poste ni promenis en la ĉirkaŭaĵo. Revene ni haltis por admiri la kastelon *Schmidtheim*. En ĉiuj vizititaj urboj ni post la promonado kafumis kaj teumis dum agrabla babilado. Por viziti la urbon Kolonjon ni veturis trajne. La stacidomo troviĝas en apudeco de la mondfama katedralo. Promenante ni vizitis la urbodomon, *Mikwe* - la judajn ritualajn banojn, parfumejon, ĉokolad- kaj mustard-muzeojn.

Ĉiumatene ni kon-



versaciis kaj pridiskutis diversajn temojn: pri paskokutimoj kaj simboloj (ovoj, lepore, sonoriloj), pri diversaj E-aranĝoj en Germanio, Francio kaj aliloke. Oni povis konsulti fotoalbumojn kun raportoj pri diversaj Esperanto-eventoj, kiujn mi alportis. Aliaj temoj estis pri malfacilaĵoj kaj lingvoproblemoj. Ne mankis amuzaj ludoj kaj iom da dancado. Vizitis nin du esperantistoj loĝantaj en la regiono.

Lu Wunsch-Rolshoven prelegis pri klimatgasa kompensado: (kompensado de produktitaj forcej-efikaj gasoj), ŝparo de energio, uzado de vojaĝrimedoj, varmigado, aĉetado-konsumado, alternativa energio (suno, vento...).

## Esperanto eniris tag-gazeton ĉe franca televida ĉeno



Esperanto estis originale elvokita ĉe "France 2" en la ĵurnalo de Elise Lucet, ĵaŭdon la 30an de majo, ĉirkaŭ la 12a20.

Temis pri reportaĵo koncerne interŝanĝon -franclingve "troc"- ne nur de varoj, sed ankaŭ de servoj -"savoirs"-...

Surprize aperis agema samideanino *Elisabeth Barbay*, kiu proponis Eo-kurson por la interŝanĝo ! La aluditan kurson ni eĉ aŭdis dum kelkaj sekundoj, post unua plano de la kalendaro 2013 de "Esperanto-jeunes" far la kamerao .

P.S - Elisabeth deziras menciigi pluajn informojn: ŝi estas membro de la tiel nomata "Réseau d'Echanges Réciproques de Savoirs" ( 9a distrikto de Parizo ). Kelkaj sekundoj da ĉeesto sur la ekrano estis "elektitaj" el pli ol 30 minutoj da antaŭa

filmo !. Por scivolemuloj: "reciproke" al ŝia Eo-kurso ŝi ricevis kurson pri desegnado.

<http://www.france2.fr/it/13h/30-05-2013>

## Je via dispono nova ilustrita vortareto !

"Karaj brikolistoj kaj esperantistoj,  
*Chers bricoleurs et espérantistes,*



La "TEKNIKA VORTARETO DE GREZILJONO"

estas preta. Vi povas printi kaj diskonigi ĝin.

Le "*PETIT DICTIONNAIRE TECHNIQUE DE GREZILJONO*" est prêt. Vous pouvez l'imprimer et le diffuser.

Reta ligo de la pdf dosiero :

Adresse du fichier pdf :

[gresillon.org/teknikavortaro](http://gresillon.org/teknikavortaro)

Vi povas trovi tion ligan sur la retejo de la kastelo Greziljono aŭ serĉe "teknika vortareto de greziljono"

Vous pouvez retrouver ce lien sur le site du château de Grésillon ou en cherchant "teknika vortareto de greziljono".

[ ... ] Tiu bela eta bilda vortaro traduktas 1809 vortojn.

Ce beau petit dictionnaire en images traduit 1809 mots.

[ ... ]

Bonan legadon kaj ne forgesu doni viajn rimarkojn.

Bonne lecture et n'oubliez pas de faire des remarques.



Amike,"

*Frédéric Lauriol*


Ano de la klubo de Angers, kaj de la teknika komisiono de Greziljono  
Membre du club d'Angers et de la Commission technique de Grésillon

[lauriol.frederic@neuf.fr](mailto:lauriol.frederic@neuf.fr)

06 88 56 77 01

10 rue Noël Pinot

49000 ANGERS



Ĉu vere

utila inventaĵo ?...

En Porto Rico, la ĉeno de "fulma manĝo" Burger King el-laboris iun sandviĉ-portilon, kiu ebligas engluti "hamburger" sen uzi la manojn !



*Ne ĉiam uzebla !*

Ĉu leĝ-permesite dum stirado de veturilo ?...





## ... "Comme un vol d'oiseaux sacrés" ...

Trevor Steele

franclingva traduko de "Flugi kun kakatuoj"



TREVOR STEELE

COMME un VOL d'OISEAUX SACRÉS

K A V A - F E C H

Ce roman, qui se passe à la fin du 19ème siècle, raconte l'histoire de la lutte entre les Britanniques qui colonisent l'Australie, et les aborigènes qui se rebellent contre l'invasion de leurs terres. Elle repose sur des faits historiques, la vérité transpire tout au long de l'histoire.

C'est aussi un roman d'aventure passionnant.

Tout au long des 262 pages, nous suivons les aborigènes *Banoubi*, et en parallèle les Blancs appartenant à différentes couches sociales. Nous faisons connaissance alternativement avec les uns, puis avec les autres, et au fil des événements nous les voyons réunis, parfois dans l'amitié, souvent dans la mort.

*Trevor Steele* a fait une fresque étonnante, pleine de vie, émouvante, non seulement de cette lutte et de ses protagonistes, mais aussi de toute la vie en Australie dans les années 1890: la recherche de l'or, les missions, les tentatives pour convertir les aborigènes au christianisme, la création de fermes dans les endroits sauvages, les atrocités commises contre les Noirs, les coutumes des aborigènes, la nature fascinante, etc ...

Mais le roman est aussi un livre de philosophie et de réflexion, car les personnages se demandent souvent s'ils agissent bien ou mal. Beaucoup de grandes questions philosophiques de la vie sont abordées, à travers les pensées des Noirs et des Blancs.

Leginda romano !

## REMERCIEMENTS

Ont collaboré à la traduction ( liste alphabétique ):

Simone ARMAND, Claude BODSON, Hélène BONJOUR, Alain CHALM, Janine DUMOULIN, Isabel GERARDIN, Joël GRANDJEAN, Louis JEULAND, Emmanuelle RICHARD, Axal ROUSSEAU, Renée TRIOLLE.

Nous adressons un merci tout particulier à Godeleine LOGEZ qui a vérifié la traduction, et à TREVOR STEELE, pour son aide et ses encouragements !

Nous remercions chaleureusement le créateur du dessin de couverture Armand HUBERT.

Ginette MARTIN

NB – de la rédaction de "La Informilo".

Bien entendu, des remerciements amplement mérités à Ginette MARTIN, qui a assuré une fonction de "logistique" à la tête de l'équipe précitée, résolvant tous les problèmes complexes liés à ce travail de groupe, pour assurer l'édition attendue -et la diffusion- d'un ouvrage qui enrichit le volet "culture" de la langue internationale.

... gratulon István !...



La plej konata kaj populara hungaria taggazeto *Népszabadság* aperigis okulfrapan, tutpaĝan (!) artikolon kun granda fotografaĵo pri *Ertl István*, konata hungara esperantisto, eksa redaktoro de revuo *Esperanto*. La artikolo rakontas pri lia ĝisnuna vivovojo, agado, kono de multaj lingvoj, ne flankenpuŝante ankaŭ la Esperantan...

La artikolo videblas/legeblas en la reto ĉe: <http://nol.hu/mozaik/20130603-ezernyelvmester>  
**"Majstro de mil lingvoj, 34 procente hungaro, 33 procente franco, 33 procente esperantisto, kaj 0 procente rasisto..."**

Sinceran gratulon al István!

Rakontante pri lia vivo en la artikolo aperas la vorto "Esperanto" 30 foje, en tute natura viva fono. Krom la personaj flankoj, certe la artikolo estas ankaŭ bona reklamaĵo por la Internacia Lingvo. Antaŭ kelkaj jaroj por aperigi similan tutpaĝan artikolon pri Esperanto, *Etsuo Miyoshi* devis pagi ĉ. 3 milionojn da forintoj...

La artikolon kompilis kaj prizorgis *Révész Sándor*, esperantista ĵurnalisto ĉe la gazeto.

Szilvási László

<http://www.facebook.com/Ret.Info>

## Ĉu Van Gogh estis mortigita?

Nederlanda pentristo **Vincent Van Gogh** (1853~1890) pafis sin per pistolo en tritika kampo antaŭ la kastelo de **Auvers sur Oise**, kiu situas 30 kilometrojn norde de Parizo, la 29an de julio en 1890. Tio estas ĝenerala opinio pri lia morto. Li loĝis en la hotelo **Ravoux** dum 70 tagoj. Nederlanda pentristo **Hirschig**, kiu loĝis kun li en la sama hotelo, trovis pafvundon ĉe la flanko de lia korpo post lia reveno el la kampo. Laŭ la filino de **Ravoux**, la mastro de la hotelo, vespere li revenis el la kampo, kie li pentris. Ŝia patrino demandis lin, ĉu io malplaĉa okazis al li, ĉar li kutime pli frue revenas por vespermanĝi kun la kunloĝantoj. Li ŝajne deziris ion diri, sed li tuj supreniris al sia ĉambro kun manoj sur la ventro. Ŝia patro kaŝe gvatis lin ĉe ŝtuparo pro lia stranga sintenado. **Vincent** kuŝiĝis sur la liton kun genuoj en la manoj, ĝemante pro doloro.

Kio vere okazis: Al la demandoj de **Ravoux** pri la okazintaĵoj, li konfesis, ke en la posttagmezo sur la kampo, kie li pentris, li pafis kaj ne maltrafis sin, li vundis sin kaj poste estis senkonscia ĝis la nokto. Post rekonsciigo li deziris mortpafi sin kaj serĉis kvarpiede la uzitan pistolon sed vane. Tiam, ne trovante alian rimedon, li revenis al la hotelo.

**Ravoux** sendis **Hirschig** al kuracisto **Gacher**, kiun **Vincent** konis. Post sia esploro la kuracisto diris, ke la stato de la vundito havas nenian viv-esperon. En la posta tago policano venis al li, kaj **Vincent** diris, ke li rajtas trakti sian propran korpon laŭplaĉe, ĉar li mem sinmortigos. Li ankaŭ diris, ke oni mallaŭdu neniun. Matene la mastro sendis **Hirschig** al la bonkora subtenanto, lia malpli aĝa frato **Theo**, por sciigi al li la malfacilan situacion de lia frato. La surpriziĝinta frato rapidis per trajno kaj jam atingis lin posttagmeze. **Theo** kaj **Ravoux** flegis lin ĝis la unua kaj duono matene, kiam li mortis. Ĵus antaŭ la morto la fratoj iom parolis en gepatra lingvo, kvankam ili ambaŭ tre bone scipovis la francan. **Vincent** faris la lastan spiron en la brakoj de la plej bona subtenanto **Theo**. Kial li sinmortigis?

Laŭ unuaj opinioj li senesperigis pro perdita amo. Li suferis pro epilepsio dum pli ol monato en 1890. **Theo** letere rekomendis al li konsulti la kuraciston **Gacher** por resanigi lin. La malsanulo sekvis lian konsilon kaj vizitis la kuraciston. La pentristo amikiĝis kun lia familio kaj eĉ faris liajn 3 portretojn kaj tiun de lia filino. Al ŝi li enamiĝis, sed la patro **Gacher** malakceptis tion. Sed iuopinie tio ne kaŭzis lian sinmortigon, ĉar li havis tendecon enamiĝi al vidvinoj, kiuj jam havis infanon. Lia onklo iam demandis lin, ĉu li nenion sentas, kiam li vidas belan virinon, kaj li respondis al li, ke li preferas virinon malbelan, malriĉan kaj eĉ maljunan kun intelekto kaj bonkoreco, kiujn ŝi akiris tra la travivaĵo kaj malfeliĉo de la vivo. Do, por li, ne eblus profunde ami la filinon de **Gacher** 19-jaran. Laŭ aliaj opinioj li timis atakon de epilepsio. La atako trafis lin ĉiun trian monaton, kaj oni enhospitaligis lin en 1889. Onidire tiun malsanon kaŭzis troa laboro, malsukceso de kunloĝado kun franca pentristo **Gauguin**, kiu okazigis teruran aferon, ke **Vincent** fortranĉis per razilo sian maldekstran oreilon pro ilia malpaco, kaj timo, ke li ne plu povus ricevi la financan subtenon de **Theo** pro ties geedziĝo.

Laŭ triaj opinioj li deziris altrii atenton de sia frato **Theo**, kiu jam ekkonstruis sian familion. Sed iuj estas kontraŭ tiu opinio, ĉar, kiam **Gacher** demandis lin pri la adreso de lia frato por sciigi al li gravan staton de sia amika frato, la vundito neniam donis ĝin al la kuracisto. Krome li foje skribis al sia patrino, ke li pentros pentraĵon por pendigi ĝin al la muro en la dormoĉambro de la geedzoj por ke la naskiĝinta bebo povu rigardi ĝin iam ajn. Li montris gratulon pro la naskiĝo de infano inter siaj frato kaj bofratino kaj ĝojis pro ilia familia feliĉo.



Van Gogh "La preĝejo de Auvers-sur-Oise" 1890

Kelkaj dubas pri lia sinmortigo kaj kredas, ke iu mortigis lin. La uzita pistolo neniam estis trovita. Laŭ la ĝenerala opinio li aĉetis ĝin de pafilo-vendisto en la najbara urbo **Pontoise**. Ĉu li havis monon por aĉeti ĝin, kvankam li vivis de mano al buŝo tiutempe? Kial li ne diris, ke li aĉetis ĝin de la vendisto, kiam la policano pridemandis lin, kie oni enmanigis al li la pistolon? Tiam li diris: "Riproĉu neniun." Kion signifas tiuj vortoj? Ĉu li protektis iun? La aktuala loko de sinmortigo ne estas fiksita. Laŭ la filino de **Ravoux** post sia tagmanĝo la pentristo portis pentrilojn al la tritika kampo en la koncerna tago. Ankaŭ ili kaj lia verko ne estas retrovitaj en la loko konfesita al **Ravoux**. Ĉu li provis alporti ilin al sia loĝejo kaj perdis ilin survoje? Verŝajne tiam li ne plu havis forton porti ilin. Laŭ la filo de kuracisto **Gacher**, troviĝis pafvundo iom sub la maldekstra ripo. La kuglo trairis talion kaj atingis femuron. Sed ĝi maltrafis koron, pulmon kaj dikajn vaskulojn. Se ĝi estus trafinta ilin, la vundito tuj mortus. Ne estis postsigno, kiun febro fare de eksplodo kaŭzus, pro tute proksima pafo al la korpo. Nature oni suspektas, ke iu pafis lin de malproksime. Ĉiokaze la majstro finis sian 37-jaran vivon, postlasinte al ni multajn misterojn pri sia morto. Kiun opinion vi subtenas?



## El nia "eùropa biblioteko" ... 93 jaroj jam forflugis !



En sia *facebook-paĝo* la *Aùstria Nacia Biblioteko* prezentas jen amuzajn, jen pensigajn malnovajn dokumentojn el sia trezorejo. Kaj pro la fakto, ke la "*Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo*" en Vieno estas parto de la *Aùstria Nacia Biblioteko*, ankaŭ Esperanto-dokumentoj estas regule prezentitaj. Ili montras, ke Esperanto ne troviĝas en kultura neni-lando, sed havas propran historion kaj mult-facedan kulturon tra la tempo. La celpubliko estas germanparolantoj, sed ĉiuj esperantistoj estas invititaj esprimi sian ŝaton per la alklako de „*Gefällt mir*“ ( *Plaĉas al mi* ).

Ĉi-foje, ekde la 26-a de aprilo 2013, estas videbla vere sensacia trovaĵo: la *Esperanto-kvarteto el Tirolo*, popolmuzikaj ŝu-klak-dancistoj **el la jaro 1930** ! La foto estas pruvo, ke jam antaŭ pli ol 80 jaroj, la universaleco de Esperanto kaj regiona agado ne estis kontraŭdiro !

<http://www.facebook.com/nationalbibliothek>

## "Esperanta Ret-radio" ... la ĉiutaga aŭd-vida servo!

"*Esperanta Ret-radio*" estas unika kaj tre interesa aŭd-vida servo, kiu ĉiutage aperigas novan 3-6 minutan son-dosieron kun aldono de ĝia skribita teksto ! Tiu solvo ebligas ne nur simple ĝui la enhavon de la sondokumentoj, sed ĝi povas tre efike helpi al instruado kaj ekzercado de la lingvo: se oni ne komprenis iun fragmenton aŭ esprimon per orelo, oni povas trovi ĝin en skriba formo per la okulo. Tre utila solvo kaj por kursanoj kaj por ekzercantoj!

"*Esperantan Ret-radion*" iniciatis aŭstra esperantisto *Anton Oberndorfer*. Lastatempe al ĝia kompilado aliĝis helpantoj el Israelo, Brazilio kaj Pollando. La regulaj ĉiutagaj elsendoj funkcias ekde 26-a de 2011; ĝis nun estas faritaj pli ol 970 sondokumentoj... Ni povos gratuli la funkciigantan teamon je la 1000-a "elsendo" !!

Laŭnhave, la temoj de la elsendoj estas tre variaj: inter ili troviĝas *tagaj interesaĵoj, notoj pri mondaj aktualizaĵoj, sciencaj novaĵoj*, kaj malofte eĉ *E-movadaj temoj*.

Lastatempe, danke al *Gian Piero Savio*, la tradician son-formaton ofte kompletigas ankaŭ mallongaj kaj bonkvalitaj filmetoj, kiuj igas la retejon eĉ pli interesa!

Pro fermo de la ĝisnuna retejo ekde majo, *Esperanta Retradio* havas novan adreson:

<http://esperantaretradio.blogspot.co.at>

Listo de ĉiuj antaŭaj elsendoj estas trovebla ĉe: <http://aldone.de/retradio>

*Jen teksto ĉerpita el la programo post alklako al la ĉi-supra ret-ligilo*



"Televizprogramoj ofte montras etan suban ekraneton, per kiu surduloj povas kompreni diraĵojn laŭ traduko fare de gestolingvo. Por tio oni en Brazilo uzas lingvaĵon nomatan LIBRAS – literoj, kiuj en la portugala lingvo signifas: "*brazila lingvaĵo per gestoj*".

Nun, *Nacia Instituto de Surduloj*, kun sidejo en Rio, decidis inversigi la grandecojn sur la ekrano. Ĝus ekfunkciis **la unua televidkanalo por surduloj**, tiel ke la bildoj en plena ekrano celas tiun specialan publikon.

Laŭ trafikaj kalkuloj, ekzistas en Brazilo ĉirkaŭ 5 milionoj da misaŭdantoj. Komence, la nova televidkanalo funkcios nur interrete, je la adreso <http://www.tvines.com.br>, sed la Instituto revas pri konvencia, prefere malferma tutlanda kanalo.

Komence, la nova kanalo provas allogi sian publikon per oportunaj programoj. Nuntempe, ili okupas entute po ok horoj ĉiutage, kaj oni produktas humur-programerojn, kurson pri LIBRAS kaj informojn pri novaj teknologiaĵoj, kiuj celas faciligi la vivon de surduloj. Aliaj, ordinaraj TV-programeroj estas "normalaj", adaptitaj per aldono de granda bildo de homo, kiu tradukas la enhavon per gestolingvo – kaj subtekstoj. Ĉi tiuj estas informaj, pri diversaj temoj, krom filmoj kaj animacioj. Trifoje en ĉiu tago oni elsendas ĵurnalojn – la solajn en Brazilo, speciale por surduloj.

Laŭ la direktorino de la Instituto, Solange Rocha, ĝi estas televido por kaj pri surduloj. La ideo estas krei pozitivan, komfortan medion por tiu publiko, kiu rajtas partopreni la mondon de "normalaj" homoj. Tiun koncepton oni maturigas jam de du jaroj. Komence, oni kreis internan televidreton en la sidejo de Instituto de Surduloj, en Rio. Nun, la celo estas pli kaj pli ampleksigi la gamon da proponataj programeroj. Oni esperas, ke surduloj mem elvolu sian kreemon kaj artemon por rekte partopreni en tiu kanalo. Jam ekzistas grupo, kiu laboras tiuvoje.

Koncerne nin, Esperantistojn, tuj aperas la demando: kial ne uzi internacian gestolingvon? Ĉu oni ripetas la mispaŝon, ke ĉiu lando havu sian propran gestolingvon, anstataŭ unu lingvo tutmonda? Ĉu iam estonte necesos ia Esperanta gestolingvo" ?

## Vision artistique d'une "UE disparue"

THOMAS BELLINCK

### DOMO DE EUROPA H

EXPO &amp; TOKTOCKNOCK



Jusqu'au 14 juin, l'exposition "*Domo de Europa historia en ekzilo*" ( dont le titre en espéranto signifie « *Maison de l'Histoire européenne en exil* ») avait pris place dans le quartier européen de Bruxelles. L'artiste, *Thomas Bellinck*, y a imaginé une avancée dans le temps où le visiteur explore, en 2060, les vestiges d'une Union européenne (UE) disparue depuis 2018 !...

Pri tio, nia amiko *Leo de Cooman (BE)*, aldonas:

... Jen informo pri tiu ekspozicio en *Etterbeek* ( Bruselo ), rekomendita de *Guy Verhofstadt*, iama ĉefministro de Belgio, nun eŭropa politikisto, en intervjuo antaŭ la flandra televido.

La aŭtoro de tiu ekspozicio, *Thomas Bellinck*, deklaris en la aludita intervjuo ... <http://www.internalvoices.org/intern-life/item/147-the-history-of-the-former-european-union>

... la jenon ( tradukita el la angla lingvo ):

"... *Okulfrapa karakterizaĵo de la ekspozicio estas la uzo de Esperanto kiel la reganta lingvo. Kio inspiris ĉi tiun elekton ?*

Bellinck: Unuflanke, tio estas parto de la stranga familiareco, kiun mi klopodis krei. La *Eŭropa Unio* estas io, kion ni ĉiuj konas, sed ne tute komprenas, kaj la uzo de Esperanto substrekas tiun punkton. Aliflanke, Esperanto estas kompreneble tre simbola lingvo, kiu estis kreita en la malfrua 19a jarcento por faciligi la interkomprenon inter personoj de malsamaj nacioj. Nuntempe ĉi tiu lingvo estas preskaŭ morta, sed en la fikcia mondo, kiun mi volis krei, eblus, ke eŭropanoj komencas re-uzi Esperanton kiel armilon en sia lukto por nova unueco".

## Cyril Hurstel, un prosélyte de la langue internationale hors du commun !

Cyril est bien connu de tous les espérantophones d'Alsace-Lorraine. En dehors de sa participation à des rencontres ponctuelles, et de ses activités d'ordre professionnel -consultant et interprète- il a choisi un thème original pour démystifier et privilégier l'Espéranto comme moyen moderne -et efficace !- "d'intercommunication".

De nombreux internautes apprécient ses vidéos qui alimentent régulièrement "youtube".

Cyril s'est fixé un challenge et un défi: "*Promouvoir le bilinguisme et interviewer une famille bilingue dans chacun des pays du monde !*".

Il s'est prêté lui-même à une interview dont nous publions quelques extraits...

" *Tes filles sont bilingues, français et espéranto. Comment ont-elles appris l'espéranto?*

- *Mes filles n'ont jamais appris l'espéranto, car elles ont grandi avec la langue! [...] En 2005 nous décidons mon épouse et moi d'introduire l'espéranto dans la vie des enfants. A partir de 2006 je me suis exprimé de plus en plus en espéranto au quotidien et nous avons mis en œuvre notre stratégie. Nous utilisons l'espéranto pour voyager et avoir des contacts privilégiés avec d'autres familles. Sous le pseudonyme collectif d'Anny Shulter, j'ai publié avec ma fille aînée un guide pratique pour les jeunes qui se rendent à l'étranger pour la première fois. J'aide les parents qui souhaitent avoir des enfants bilingues par mon site: <http://blog-bilinguisme.fr>*



## UEA "malfermas pordon" !

Kiel ĉiujare *Universala Esperanto-Asocio* proponas specifan rendevuon sub la titolo "*malfermitaj pordoj*" en Roterdamo. La evento estas trafa okazo por la ĉeestantoj mal-kovri la sidejon kaj ties finkiadon.

Ĉi-jare prelegis Kalle Kniivilä el LUND ( Svedio ), kiu aludis sian profesion.





# El nia libro servo

## Informoj



La libro servo partoprenos la 19/20ajn de oktobro 2013 la venontan komunan aranĝon en aŭtuno, ĉe niaj geamikoj de Bavelo, en Speyer, Germanio.



## Novaj libroj



1



2



3



4

Pluraj libroj alvenis al la libro servo el Lublin en Pollando, senditaj de nia samideano kaj brila preleganto de lastjara stagho : Tomasz Chlielik, kiuj kontribuis al ilia eldonado. La libroj estas ofte dulingvaj : pola/esperanto,

**1) Bjalistokaj kajeroj**, noveloj, Opo, Bjalistok (2012) 80 paĝoj. 4,50 €. Deko da tekstetoj en la du lingvoj.

**2) Ne ekzistas verdaj steloj**, « mikronoveloj », Liven Dek, Mondial (2012), 126 p. . Prezo: 12,00 €.

Etaj tekstoj poezie prozaj pri diversaj temoj,

**3) Epizodoj**, Poezio, Lidia. Bjalistoko (2012), 100 p, 7,50 €. Dulingva. 44 poeziaĵoj tradukitaj el la pola.

**4) Polino** Romano, Bajram Karabolli (2012) 100 p, 7,50 €. Dulingva romaneto ĉerpita el realaĵo. Pri malfeliĉa vivo de Polino en Albanio, dum la komunista regado, post geedziĝo kun tiea junulo.

## Por mendi librojn :

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝto al : Libro servo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉisuban mendilon)
- per e-poŝto al «[libroservo\\_efe@wanadoo.fr](mailto:libroservo_efe@wanadoo.fr)»
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkosto)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libro servo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCR., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.



## Nove alvenintaj libroj :



1



2



3



4



5



6

**1) Malamu vin unu la alian**, « mozaika romano », Manuel De Seabra, Mondial (2009) 228 paĝoj. 16,50 €. « en formo de epizodoj el la propra vivo, de rakontetoj pri amikoj, priskriboj de politikaj eventoj kaj personoj, psikoloiaj kuriozaĵoj, realismaj kaj absurdaj prozetaĵoj, la aŭtoro kunmetas, eron post ero, grandan bildon pri sia lando, sia vivo, kaj pri la pasinta jarcento en tiu eŭropa angulo, kiu vivas de 1926 ĝis 1974 sub armea kaj diktatora regado »

**2) Babiladoj de bonhumora Zamenhofano**, Movado Jakobo Sapiro, Bjalistoko (2011), 76 paĝoj. Dulingva. Prezo: 10,00 €. Kun aldonita k-doro, Humuraĵoj pri la movado.

**3) La princo ĉe la Hunoj**, Romano **Eugène De Zilah**. Mondial (2011), 624 p, 28,50 €. . Ĉina princo, ribela kontraŭ la unua imperiestro rifuĝas en la Huna teritorio, kie li fariĝas eminentulo. La tiamaj Hunoj klopodas unuiĝi antaŭ la ĉina minaco...

**4) Pro kio ?**, romano, Friedrich Ellersiek, Mondial(1999), 156 paĝoj. 12,00 €. Reeldono kun etaj modifoj de originala romano verkita en 1920. «Drameca teksto, interesa kaj kultura, historia kaj psikologia vidpunktoj, ne ĉiam intencitaj de la aŭtoro».

**5) Vojaĝo al kuniĝo** romano, Darik Otira, Mondial (2010), 366 paĝoj. 21,00 €. La subtitolo « konfesoj de sekobsedito » bone resumas la enhavon de la libro. Libro malkonsilinda al infanoj kaj al direktoroj de grandaj monaj internaciaj organizaĵoj !

**6) Jezyk miedzynarodowy** movado, Zamenhof, Bjalistok(2010), 48 paĝoj. 7,50 €. Pola versio de la unua libro aperinta en 1887.

## Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn:

-  
-  
-  
-  
-

al jena adreso:

S-ro/ino  
-  
-  
-  
-

En

la

Subskribo:



# ni prouu rideti!



Profesoro pri filozofio klarigas al sia studentaro ...

"Ni devas ĉiam relativizi! Unue gravas ĉefaĵoj kiel vivo, morto, malsato, kaj aliflanke etaj nevaloraĵoj!"

Subite li paliĝas ...

"Diable, mi tute forgesis informi mian edzinon, ke ŝi ne forgesu registri la elsendon pri la vespera pied-pilka matĉo!"



Iu kuracisto informiĝas ĉe unu el siaj kuracatoj...

"Nu, ĉu la supozitorioj, kiujn mi preskribis al vi dum mia lasta vizito bone efikis?"

- Hem, estimata Doktoro, mi devas konfesi, ke komence, tio certgrade surprizas, ĉar la aĵo pastiĝas, kaj plue gluiĝas ĉe la dentoj. Sed kvietiĝu, mi ja alkuti-miĝas!"



Viro dezirante vendi sian veturilon, lokiĝas ĉe la malantaŭa vitraĵo de la aŭtomobilo slipeton, sur kiu oni povas malkovri, grandformate, la numeron de lia poŝtelefono.

Li trankvile veturis al sia laborejo, kiam subite ekmuzikas la aparato. Ĝin li rapide kaptas kaj aŭdas ...

"Bonan tagon! Ĉi-tie voj-polico ... Ni sekvas vin. Ĉu vi scias, ke estas malpermesate telefoni stirante? Bonvolu halti ĉe la vojrandoj!"



Juna turistino vizitas malnovan, skotan kastelon. Fine de la vizito scivole demandas la gvidiston, ĉu ŝi ŝatis la malkovron.

Fakte la junulino kuraĝas mencii, ke ŝi plurfoje iom timiĝis, je la penso ke povus aperi fantomon!

"Kvietiĝu Sinjorino, neniam mi trafis fantomon depost kiam mi ĉi-tie deĵoras!"

- He... Kiam vi dungigis?

- Momenton... Jes! Antaŭ tri jarcentoj!"



Aŭtomobilisto, eksternorme ekscitita, alparolas strat-policiston, kiu promenas sur trotuare...

"Sinjoro, imagu! Mian veturilon oni ŝtelis! Ĝi lokiĝis tie, fronte al la butiko de la ŝuisto!"...

La policisto, afable, provas konsoli la pledanton...

"Ĉu vere? Oni povas diri, ke bonŝancon vi havas! Se ĝin mi estus vidinta, vi ricevintus monpunon pro neatento pri la fakpanelo!"



Tiu viro rehejmiĝas post profesia vojaĝo iom pli frue ol programite. Ĉar noktiĝas, li eniras taksion.

Antaŭ la dompordo, li petas la ŝoforon igi atestanto, ĉar li suspektas, ke lia edzino malfidelas. La taksi-stiranto konsentas... kontraŭ 150 €.

Ambaŭ silente eniras, malfermas zorgeme la ĉambropordon. La edzo lumigas la ejon kaj, fortirante la lit-kovrilon, malkovras la amorantan paron!

Sub impulso de kolerego li malfermas la tirkeston de la lit-tableto kaj ekkaptas revolveron!...

Je tiu momento ekkrias la edzino ...

"Ne pafu! Ne pafu!... Mi mensogis! Mi ne heredis post la forpaso de la onklino! Jen li, kiu aĉetis la "Ferrari", kiun mi ofertis al ci, ankaŭ nian jakton kaj la dometon ĉe la lagorando! Niajn impostojn li plue pagas kaj la biletojn de la unua rango en la stadio, kiam ci spektas matĉon!"...

La edzo, konsternita, okulumas al la taksi-ŝoforo ...

"Kiel vi kondukus je simila evento?"

- Nenia eta cerbumadeto! Mi delikate remetis la litkovrilon, por ke li ne malvarmiĝu!"



Iu laboristo, kiu petis rendevuon ĉe la uzin-estro estas invitita eniri ...

"Kion vi deziras karulo mia?"

- Unue, estimata ĉefo, permesu, ke mi uzuvian telefonon por urĝe voki mian edzinon. Ŝi postulis, ke mi demandu salajropluaĵon, sed tute forgesis mencii la grandecon!"

Vagabondo, kiu jam de pluraj horaj piedumas trafas finfine restoracion, sur kies ŝildo li legas "Albergo de Viktoro kaj la drako".

Li eniras kaj li heziteme petas...

"Ĉu vi havas ion por manĝi?"

- Ne!

- Nu, eble simplan glason da ruĝa vino?"

- Ne!

... nur glason da freŝa akvo?"

- Nee!...

- Bone ... Ĉu mi povas paroli al Viktoro?"



Iu avo sidas kun sia nepo ĉe riverbordo. Li informas la etulon pri la multaj vivŝanĝiĝoj okazintaj de post kiam li estis infano.

"Imagu! Kiam mi estis samaĝa kiel ci, mia patrino komisiis min por aĉeti varojn en nia vilaĝa eta butikio. Pripensu! Al mi ŝi donis monerojn, kiuj hodiaŭ valorus ne pli ol 75 centimojn da €! Mi rehejmiĝis kun kvaronfunto da butero, duonlitro da laktokremo, dika peco da fromaĝo, unu kilogramo da sukero, pakaĵo de biskvitoj kaj ses ovoĵoj!"

La uleto, perpleksiĝas kaj scivoleme alparolas la avon...

"Mirige kaj mirinde, avĉjo! Ĉion-tion, ci sukcesis ensakigi? Sed ĉu mi devas dedukti, ke tiuepoke, ne ankoraŭ funkciis kontrol-alarma?"



La juna Roberto, kiu komencas legleradon, rehejmiĝas post la lerno-tempo.

Scivoleme informiĝas la patro...


"Ĉu ci progresis hodiaŭ? Ĉu ci ricevis bonan noton?"

- Ne, paĉjo! Nia instruistino vokis min por elĉifri frazon, kiun ŝi skribintis ĉe la tabulo:

"pa-ĉjo-ple-zu-re-fu-mas-si-jan-pi-pon" Kompreneble mi kapablis legi, sed mi demandis al ŝi ... Ĉu vi nenion aŭdis pri la kontraŭtabak-kampanjo?"

# distra angulo

## 1 - krucvort-enigmo



### HORIZONTALE

- 1 Prizorgad' de utilaj insektoj.
- 2 Homo, kiu abunde parolas.
- 3 Movige. Pasinta temp' depost la naskiĝo. Akvobird'
- 4 Rilatanta al loĝanto de israela urbo.
- 5 Rusia montara ĉeno. Islama titol'.
- 6 Verdiri denove.
- 7 Nedefina adjektivo. Speciala klaŭz'.
- 8 Ekipiĝi, sen konsonoj ! Posteularo.
- 9 Nur, sen koro ! Egipta rivero. Prepozicio.
- 10 Kaŭzi teruron al iu. Pli ol necese.

### VERTIKALE

- 1 Mezgrada diplomito.
- 2 Il', kiu fermas la vojon. Esprimi denove.
- 3 Glata land'.
- 4 Pronomo. Blanka metal'.
- 5 Tuto de la insignoj de nobelo. Sufikso.
- 6 Apartenanta al monarko. Naiva amor'.
- 7 Sufikso. Stato kaj regado de monarko.
- 8 Apartenanta al barko kun du pagajoj.
- 9 Inverse: rilatanta al romano aŭ milanano Malkorektaj'
- 10 Monunu'. Usona mezurunuo de longo.

Dankon al nia kontribuanto Joël GRANDJEAN

Omaĝe al Yvan AUDOUARD, franca humuristo !

## 2 - vertikala enigmo

- |                   |                          |
|-------------------|--------------------------|
| + - - + - - - -   | fortikaĵo en Ateno       |
| + - - + -         | travidebla materio       |
| + - - + - - - -   | jar-libreto              |
| + - - + - - - - - | atomnumero 7             |
| + - - + - - -     | kuracrimedo              |
| + - - + - -       | profundo                 |
| + - - + - - -     | provinco NE de Ĉinio     |
| + - - +           | argila tero              |
| + - - + - -       | futbal-piedmovo          |
| + - - + - - -     | balta lando              |
| + - - + - - -     | antikva despoto          |
| + - - + - - - -   | detala esploro           |
| + - - + - - -     | ĉina urbo                |
| + - - + -         | mezepoka, longa batalilo |
| + - - + - -       | saltanta insekto         |
| + - - + - - - -   | amerika mamulo           |
| + - - + - - - - - | faka kuracisto           |
| + - - + -         | rivero                   |
| + - - + -         | seksa impulso            |
| + - - + - - - - - | simio                    |

Dank' al la vorteroj ĉi-sube alfabete ordigitaj, retrovu kaj lokigu la vorton trovitan laŭ la difino.

La unua kaj kvara kolumnoj vertikale legitaj proponos al vi humuran citaĵon de Yvan AUDOUARD.

ab ak ak al blo bra ce ci co di do do dri ek er es  
fa ge ĝji is ki ko lan li lo lo ma me mo na nan ni  
nio no no no no no ok os oto pa pio pio po  
po po ra rejri ro ro sa te teo to to tra tro tro vi  
za

## 3 - Ŝmilblik

Kiel kutime, kaŝita koboldo en la klavaro denove malicis ! Ĉiu letero de la Eo-alfabeto iĝis alia dum la tajpado ! Ekzemple, ĉiuj s de la originala teksto iĝis a !

a r z m r b k c / p b /

b a r d a / e b f b g d /

a b g / g d p s / d m /

o f c e f b a c t / g b /

m d / a k j b p k c / b

a o b f b h m b / r j c /

o c i d a / a z s k b a j

Dua citaĵo de la franca humuristo

Indico: tiu citaĵo rilatas kun lia fama "malfermita letero al la stultuloj" ( "lettre ouverte aux cons " ).

Yvan AUDOUARD ( 1914 / 2004 ), instruisto pri la angla lingvo, verkis ankaŭ romanojn, film-dialogojn...





Nacia Kongreso - ARTIGUES  
prezento de la nova estraro de ESPERANTO France



Nacia Kongreso - ARTIGUES  
koruso *Interkant'* prezentas "KARMEN"



SAT-Amikaro plenplene ĝuis sian jaran kongreson en METABIEF (25370)  
(francilingve, elprononci METABJE)



el la riĉa programo de la aŭtuna renkontiĝo  
de BAVELO kaj ESPERANTO France-Est



"Le Torrent" en STORKENSOHN (68)  
feri-centro, kie okazos la printempa  
"kultura semajnfino" 2014  
de ESPERANTO France-Est



kiel ili, aprezu la varman etoson de la kastelo dum la someraj aranĝoj !



maldekstre :  
Dum vizito de St-Mihiel  
("urbo" de LIGIER RICHIER),  
Catherine KREMER,  
nia profesia gvidistino,  
ankaŭ esperantistino !

dekstre:  
mirinda majstroverko  
de la fama skulptisto

